**N I A  V O Ĉ O**

# Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **SEPTEMBRO-OKTOBRO 2001**

## REELDONO DE "Nuevo método de esperanto"

REAPERIS LA PLEJ ELSTARA HISPAN-LINGVA LERNOLIBRO

Post kelkjara interrompo, reaperis en aktualigita eldono la jam fama lernolibro por hispan-parolantoj de la Akademiano Fernando de Diego.
De Diego -la klera vortaristo kaj tradukinto en Esperanton de ĉefverkoj de Cervantes, Lorca, Cela, Márquez, Neruda, Hemingway, Balzac, Maupassant kaj multaj aliaj- instruas en 10 dialogoj (220 paĝoj) ĉiujn aspektojn de la Esperantaj strukturo, gramatiko, sintakso kaj metriko;
krome, li proponas al la lernanto Esperantajn parol-turnojn, vortolistojn, multnombrajn praktikajn ekzercojn kun fina ŝlosilo kaj laŭtema indekso.
Kompletigas la verkon informoj pri la praktika uzado de Esperanto kaj pri la E-asocioj en la hispanlingva mondo.
La lernolibro de de Diego estas la plej elstara atesto pri la lingvaj kaj kulturaj valoroj de Esperanto. Ĝiaj antaŭaj du eldonoj aperis respektive en 1982 kaj 1992 zorge de la societo "Heroldo de Esperanto" (ne konfuzi kun la nuna samnoma senrajta gazeto), kiu societo transdonis senpage siajn eldon-rajtojn al la Hispana Esperanto-Federacio.
La nuna tria eldono aperas en la kadro de fakaj prilingvaj libroj de la Madrida eldonejo Gram Ediciones.

Prezo: 7,52 EUR (1.250 ESP) inkludas impostojn sed ne sendokosto.
Rabato: 20% se vi acxetas pli ol 10 ekzempleroj.

Petu al:

Esperanto Liceo de Madrid
San Alejandro 6 - 4ºB-Ext
28005 Madrid
Tel/fax 91 446 80 79
admin@esperanto-es.net

## UK- ZAGREB

Sufiĉe multe da hispanoj partoprenis la ĉi-jaran UK en Zagreb (Kroatio), pli multnombre ol kutime, inter ili la membro de MEL Angelita Sanz.
La prezidanto de la lando, Stjepan Mesic, vizitis la kongresejon kaj alparolis la kongresanojn dum la inaŭguro. La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj kaj Asista Ĝenerala Direktoro pri Edukado de UNESKO sendis bondezirajn mesaĝojn al la 86ª UK.
Estis du kongresejoj: en la plej luksa okazis nur kelkaj programeroj: inaŭguro, fermo, kelkaj teatraĵoj, ... dum en la pli modesta oni okazigis plejparte la diversajn kunvenojn; ankaŭ en ĝi troviĝis restoracio, informejo, parkejo, ... kaj tiu "fama" ŝtuparo, kiu ne povas manki en E-renkontiĝoj, kaj kiu taŭgas kiel babilejo kaj renkontejo de la kongresanoj. Ĝenerale, oni povas diri ke tiu ĉi " ĉiutaga" kongresejo ne estis taŭga por UK. Temis pri simpla mezlernejo, sufiĉe modesta kaj, de tempo al tempo, malkomforta, kun grandaj problemoj por la handikapuloj, kiam ili devis atingi suprajn etaĝojn.
Kiel kutime, estis ekskursa tago. Kelkaj hispanoj, kune kun aliaj eksterlandanoj ĝin profitis por private viziti la faman naturparkon de Plitvice, kie renkontiĝis kun la ekskursantoj, kiuj partoprenis la kutime multekostan oficialan ekskurson.
Aparte brila estis teatraĵo okazinta ĉe la Nacia Kroata Teatrejo, kun elstaraj aktoroj esperantistaj. Laŭdinda ideo estis la dancejo organizita en la cefplaco de la urbo kaj malfermita al ĉiuj homoj.

Ĝi vere efikis kiel propagandilo.
Ankaŭ aplaŭdindaj estas la demarŝoj faritaj de la LKK por ke ĉiuj kongresanoj havu la rajton tute senpage veturi ene de la urbaj tramoj. Tio evitis kromajn elspezojn en urbo pli multekosta ol esperis la diversaj eksterlandanoj.

**NIA VOĈO SEPTEMBRO-OKTOBRO 2001**

Kaj kun vetero tre varma, en kongresejo ne klimatizita, tagoj rapide forpasis kaj alvenis la kutimaj larmoj ĉe adiaŭoj kaj ĝisrevidaj deziroj dum venontaj UK, kiujn oni okazigos en Fortaleza (Brazilio) kaj Gotemburgo (Svedio). *(J.Miguel García Iturrioz)*

**NEPALA AMIKECO**

Carmen Suárez kaj Lupe Sanz feriis en Tibeto kaj dum ilia restado en Katmanduo ili kontaktis kun Nepala Esperanto Asocio. La vicprezidanto, la kasisto kaj unu membro donis ilin bonvenon en la flughaveno kaj montris la plej gravajn lokojn de la urbo. Kiel adiaŭo la nepalaj esperantistoj ofertis vespermanĝon en tipa nepala restoracio.

**ESPERANTO EN AMAS-MEDIOJ**

Laŭ la lasta informo de UEA ("Esperanto" majo 2001) estas ses radioj kiuj elsendas programojn en esperanto: Radio Aŭstria Internacia, Ĉina Radio, Havana Radio, Pola Radio, RAI Internacia kaj Vatikana Radio. Bedaŭrinde kaj malgraŭ la protestoj senditaj, Estona Radio ĉesigis sian ĉiusemajnan esperantan elsendon kiu daŭris 12 jarojn.

Denove la revuo "Perfiles" (julio-aŭgusto) kiun eldonas ONCE (Hispana Asocio de Blinduloj) aperigas novaĵon pri esperanto, en tiu okazo temas pri la fermo de la e-kursoj en Filologia Fakultato de La Laguna (Tenerife)

La hispana ĵurnalo "El País" aperigis 2001-09-02 artikolon titolitan "Kiel interkompreniĝi en Eŭropa Unio". En ĝi analiziĝas la nuna kaj ĵus estonta lingva situacio en EU, ties kostoj, la rolo de la angla lingvo malfavore al aliaj "povaj" lingvoj -hispana, franca, germana- kaj la "brila" solvo kiun ekpensis la Prezidento de la Komisiono, Romano Prodi, konsistanta el tradukado pere de "pivot-lingvoj", t.e., tradukado malrekta pere de la angla kaj eble la franca lingvoj (tio certe memorigos multajn pri nia projekto RELAIS, kiu celas similan malrektan tradukadon sed per esperanto kiel pivota lingvo). Ŝajne la afero debatiĝos ĉi aŭtune. Esperanto estas nur menciita flankece kaj malfavorege en suba apartaĵo kie legeblas: "Forvaporiĝinta la neniaĵo kiu iam estis esperanto, eble la angla iĝos finfine la "lingua franca" de eŭropanoj."

"ABC" 2001-09-01 aperis mencioj favore al esperanto en artikolo pri eŭroj.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ni komencos la lundajn kunversaci-rondojn la venontan 1-an de oktobro, ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj: 15-a de oktobro. "Zagrebo, la urbo de la U. Kongreso". Lumbildoj

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

29 septembro-6ª oktobro. 9-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Lloret de Mar (Gerona): kursoj, prelegoj, ekskursoj, "habaneras" kaj "cremat" ĉiuj en esperanta etoso organizita de KAE
30-a Kataluna kaj 3-a Transpirenea Kongreso de Esperanto. Ĝirono 12-a ĝis 14-a de oktobro